"The video is a trailer (reklamo) for Jackson's new double CD of greatest hits "History" to be released (eldonata) in November. It will be screened around the world from Oct 1, on TV, in cinemas, in planes, everywhere. Recently shot over 10 days in Budapest, the three-and-a-half-minute movie is thought to be the most expensive film (per minute) ever made in Hollywood : with a budget of over \$6 million, it costs nearly \$30000 a second. (...) The commercial for Michael Jackson's "History" is set to newly composed classical music, has a deliberate Fifties socialist, propaganda feel to it and features (montras) Jackson at the head of a triumphal Roman march through the gates of Budapest to the royal palace. The film's dialogue is Esperanto - Wainwright's idea - "the voice of universal brotherhood" he succeeds in blurting out without cringing (li sukcesas elbuŝigi sen naŭziĝo)." En fait, la sortie du disque va être retardée.

En France (info Eurokka), le journal TéléStar engage (du pied gauche) en publiant dans son numéro du 19 au 25 novembre, page 16, un article à l'ironie douteuse, sous le titre "ESPERANTO JACKO" : "Michael Jackson s'est mis à l'esperanto, la langue internationale, pour la promotion de son prochain album. Les dialogues du

clip publicitaire sont eux-mêmes en espéranto et il a coûté 36 millions de francs. Gâchis, puisque l'espéranto n'est pas mieux compris autour de la planète que le Yaourt (Ndr : langue de la banlieue)". Les réactions du monde espérantiste ne se sont pas fait attendre. Le numéro du 10 décembre 1994 fait état des courriers de Laurent Vignaud, Jean-François Cousineau, ainsi que de P. Signoret de Souillac (46). Pas du tout agressif, ce dernier termine par "tôt ou tard, tout le monde y viendra" (*PASSERELLE). Le magazine Télé 7 Jours a publié le courrier d'une certaine S.R. (*JF06).

Dans le Parisien, début janvier : "Le clip qui va annoncer la prochaine sortie de "History", le double CD reprenant les grands succès de Michael Jackson, sera à la mesure de la renommée de la star américaine. On le verra en Statue de la Liberté, un hélicoptère tournant autour de lui avec des effets spéciaux à la Spielberg. Ce double album qui comprend 7 inédits, sans cesse repoussé, ne sortira pas avant avril, chuchote-t-on chez Epic, la maison de disques du chanteur." (*VIVRE)

Le plus récent est Star Club (13 rue de la Cerisaie (!!!), 75187 Paris cedex 04), et encore une fois on constate que les a priori négatifs prennent le dessus : "Michael Jackson s'est mis à l'espéranto, la langue européenne, pour la promotion de son "best of" dont la sortie a été repoussée au printemps. Même les dialogues du clip publicitaire sont en espéranto, et il a coûté 36 millions de francs. Un véritable gâchis, car rares sont ceux qui comprennent cette langue !" (*JEFO89).

POLITIKO


Auguste Huberdeau, ex-président de la Commission Espéranto des Verts travaille maintenant avec Waechter au sein du nouveau Mouvement Ecologiste Indépendant (**ESPER06*).

En Angleterre, le Parti Libéral (centriste) a pris position en faveur de l'espéranto (**PETRO*, *el Radio Vieno*).

Le Groupe Non Violent Louis Le Coin de Dunkerque, cherche tous renseignements utiles concernant le groupe parlementaire pour l'espéranto. Il est prêt à contacter tous ses parlementaires locaux, avec l'aide d'autres associations de la région (Dunkerque-Eo, Citoyens du Monde, Verts, ...). Si vous avez la moindre information susceptible de les aider, merci de les contacter, ou d'écrire à JEFO qui transmettra (**JEFO49*) ♦

GAZETARO

L'espéranto est cité dans la rubrique "Le saviez-vous ? Mille et une histoires vraies et insolites" d'un *Sélection du Reader's digest* de fin 94, page 175, "La fin du châtimeur de Babel", avec une mention curieuse : "1200 chapitres répartis dans 110 pays" (**ESPER06*), peut-être une mauvaise traduction de l'anglais "1200 sections in 110 countries" (**JEFO78*) ou un sens religieux du mot (**RAFI*).



Dans *Univers Mac*, revue spécialisée dans l'ordinateur Macintosh, mai 1994, page 8, dans le sommaire : "Format unifié de document : le rêve "espérantiste" n'est pas pour aujourd'hui, mais..." (**JEFO78*). Le rédacteur en chef d'*Univers Mac* connaît l'espéranto, puisqu'il avait, il y a quelques années, publié un article présentant la pile Hypercard distribuée par JEFO.

Dans *Globe Hebdo*, semaine du 17 au 23 février 1993, page 68 : "Si vous ne parlez pas couramment l'espéranto, le volapük, le verlan, le louchebem ou le langage informatique ADA, vous pourrez toujours vous mettre au "azart". (...) Son principe est simple : chaque lettre correspond à une forme de ligne, à une couleur, à un geste et une note de musique" (**ZENO*).

Silence, la "revue de l'écologie, des alternatives et de la non-violence" (4 rue Bodin, 69000 Lyon) a publié dans son dernier numéro de 1994 un article d'un quart de page

ESPERANTO EN MALESERANTIO

En direct de malesperantie

Voici une nouvelle version de la rubrique *GAZETARO* qui présente les références à l'espéranto dans le monde non espérantiste. Ces informations proviennent d'espérantistes, et principalement des minitellistes (les pseudonymes précédés d'une étoile verte !). Ces trois derniers mois ont été particulièrement riches. Nous comptons sur vous pour qu'il en soit de même dans les prochains numéros ♦

LIBROJ

Comme tous les ans, l'encyclopédie *Quid* consacre plus d'une colonne à l'espéranto (**ESPER84*), et indique le nombre de ses locuteurs : deux millions (chiffre que nous avons repris pour l'émission sur Canal+) selon une évaluation de l'université de Washington (**SHAVI*) ♦

sur l'Europe, l'absurdité et l'inefficacité du système de traduction et sur la solution par l'espéranto (**JEFO49*). Elle récidive dans le premier numéro de 1995 en présentant le *Movado* sur une demi-page. Des contacts ont été noués avec JEFO et les résultats positifs commencent à apparaître (**PASSERELLE*).

La revue *Vivre au présent* (750 000 exemplaires), destinée aux cadres retraités, membres de la mutuelle CAPI-MEP, a diffusé dans son numéro 40 du 4ème trimestre 1994 une enquête : "Parlez-vous l'espéranto ? Une communauté bien vivante", par Philippe Leroy (**JEFO49*).

D'autres revues emploient le mot Espéranto, mais parfois dans un contexte totalement différent. Le journal en anglais *The European* publie un article intitulé "Visual esperanto ! Les photos contemporaines pourraient être l'art recherché du futur" (**ESPER06*).

Le mensuel gratuit des TGV *Grandes Lignes*, page 29 : "Il y a le français, ... et puis encore quelques centaines de langues. Plus une, étrange dialecte, mélange de sabir et d'espéranto : le langage des entreprises..." (**VORTARO*) ♦

TELEVIDO

Dans *Culture Pub* sur M6, fin novembre, un professionnel de la pub explique comment faire passer les odeurs à l'écran : "Comment imaginer l'espéranto olfactif ?" (**JAKA*).

Le 15 décembre à 7H50 sur France 2, on a parlé de Zamenhof dans *Télématin*, à l'occasion de l'anniversaire de sa naissance (**PASSERELLE*) ♦

FAMULOJ

Le nouveau président du Conseil de l'Europe, Daniel Tarschys, est suédois et il a appris l'espéranto comme deuxième langue quand il était enfant. La revue *Esperanto* lui consacre une interview de deux pages dans son numéro de Janvier. Cette année, c'est un espérantiste qui a reçu le prix Nobel d'économie : **Rheinhold Selten**. La nouvelle est parue dans le *New-York Times* du 12 octobre, section D, page 6:

"In addition to speaking German, French and English, he also speaks Esperanto, an artificial language invented in the 19th century and intended to be a universal language. He describes himself as an idealist and a member of the Esperanto movement."

[*"Krom parolanta la germanan, la francan, kaj la anglan, li parolas ankaŭ Esperanton, kiu estas artefarita lingvo elpensita en la 19a jarcento kaj celita kiel universala lingvo. Li priskribas sin kiel idealisto kaj membro de la Esperanto-movado."*] (source : Internet). Le prix Nobel est passé le 6 décembre 1992 dans l'émission *Transit d'Arte* à

KINARTO

Le film *L'Effrontée*, avec Charlotte Gainsbourg, est passé à la télévision début novembre. Un jeune marin y annonce qu'il a commencé l'espéranto pour parcourir le monde. Le personnage est assez ambigu, c'est plutôt un paumé, (...). S'il ne viole pas l'imprudente qui l'a suivi dans sa chambre d'hôtel, c'est uniquement parce qu'elle l'assomme avec un lourd globe terrestre en verre... (**ESPDOMINIK16*). Ce que l'on sait sans doute moins, c'est que Raymond Boré, espérantiste de

Chambéry, était figurant dans ce film (**JEFO49*).

Il y a quelques années, *Babel*, un téléfilm de 40 minutes en couleurs a été tourné en espéranto. Intéressant pour ceux qui aiment les films expérimentaux à portée philosophique et qui se déroulent dans une ambiance post cataclysmique (...) En fait, il ne faut pas considérer ce film comme une pub pour l'espéranto, ce qu'il n'est pas ! (...) A noter que ce film est sous-titré en français... Il est disponible en cassette vidéo au prix de 180FF chez *Literatura Foiro* (**JF06*) ♦

14

20H40 (**ESPER06*). Il n'y a pas eu l'occasion d'évoquer son espérantisme.

La jeune championne d'échec **Judith Polgar** parle espéranto. Le journal *Libération* du 10 novembre cite sa mère, page 34 : "elle aime l'espéranto : c'est une langue qui aide les gens, les ouvre vers les autres". Judith considère l'espéranto comme un amusement, sa mère lui ayant appris 5 autres langues (**KORO*). Le lendemain, *France-Info* reprenait l'information, toutes les heures, dans les mêmes termes (**PASSERELLE*).

Le pape **Jean-Paul II** utilise maintenant régulièrement l'espéranto comme avant dernière langue

juste avant le polonais lors de ses allocutions (Pâques, Noël).

Une autre célébrité apparaît de façon tout à fait inattendue dans le mode espérantiste : **Michael Jackson** (voir développement page 12).

L'auteur du "Nom de la Rose", **Umberto Eco**, a parfaitement étudié le

problème des langues. Son nouveau livre, "la Recherche de la langue parfaite", consacre plusieurs pages (364 à 370) à l'espéranto (**ESPER06*). Invité par Bernard Pivot, dans l'émission *Bouillon de Culture*, le mot "espéranto" a été prononcé au maximum trois fois (**ESPER84*). Interviewé dans l'*Événement du Jeudi* du 13 au 19 octobre, page 100 : "J'ai eu des surprises. J'ai étudié une grammaire de l'espéranto (ça ne veut pas dire que j'ai appris à le parler) et j'ai constaté que c'est une langue construite avec intelligence, et qui a une histoire très belle. Son inventeur, Zamenhof, avait une sorte de religiosité, un désir de concorde universelle ; ça compte". Plus loin, il ajoute : "La langue véhiculaire devient une nécessité. Si ce n'est pas l'anglais, ce pourrait être l'espéranto" (**ESPDOMINIK16*), puis : "Pour la première fois, deux conditions indispensables existent : la nécessité de choisir une langue acceptée par tous et la présence des mass-media qui pourraient la répandre rapidement. Je ne dis pas que ce soit réaliste dans l'immédiat. Mais c'est moins utopique qu'auparavant" (**JF06*) ♦

RADIO

Le 25 novembre à 20H30, Jean Marin (*SAT*) était interviewé sur la radio FM *Paris Pluriel*, 103.6 MHz, sur le thème "Les économies coréennes et japonaises face à l'économie européenne". L'espéranto a été évoqué (**ILI, el Telefona Reto*).

Sur *France-Culture*, le 15 janvier au matin, l'émission "Écoute Israël" informait qu'après la révolution d'octobre, un groupe israélien a créé une communauté en Union Soviétique avec pour langue quotidienne l'espéranto (**PETRO*).

L'espéranto s'étend sur les radios toulousaines. *Eurokka* qui faisait des émissions sur *Radio FMR* (89.1 MHz, Jeudi 19-20H) depuis cinq ans, est maintenant aussi relayé par *Canal Sud* (92.2 MHz, Lundi 20-21H) et sur *Radio Occitanie* (98.3 MHz, Jeudi 19-20H), de bonnes heures en terme d'audience (**VIVAKVO*) ♦

Koran dankon al E-minitelistoj : Yves Bachimont (**VIVAKVO*), Eric Benech (**ESPER06*), Bernard Bigonnet (**ESPER84*), Jean-François Cousineau (**JF06*), Dominique Couturier (**ESPDOMINIK16*), Jean-Pierre Danvy (**VORTARO*), Thierry Dangu (**ZENO*), Christophe Féré (**JAKA*), Daniel Lageiste (**KORO*), Didier Loison (**JEFO89*), Petro Martignon (**PETRO*), Murielle Onorati (**VIVRE*), Francis Soghomonian (**SHAVI*), Jean-Pierre Travers (**PASSERELLE*), Laurent Vignaud (**JEFO49*) et votre serviteur (**JEFO78*).



LA TRAGIKA DESTINO DE LIDJA ZAMENHOF

D - r o
Ludo
viko

Lazaro Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de

Esperanto kaj lia edzino Klara, naskita en Silbernik (1863-1924), havis tri infanojn : la plej aĝa Adamo (1888-1940) fariĝis medicindoktoro. Ni memoru, ke lia patro estis okulisto. Sofia, la unua filino (1892-1942) iĝis kuracistino pri internaj malsanoj. Lidja (1904-1942) atingis la gradon de magistrino pri juro.

Ĉiuj bone praktikis la internacian lingvon kaj ofte partoprenis diversajn aranĝojn kaj solenaĵojn de Varsoviaj Esperantaj societoj, digne reprezentante la familion Zamenhof. Sed la plej aktiva kaj fervora praktikantino estis la plej juna infano de la paro, Lidja, karese nomita Lili...

Ŝi naskiĝis la 29an de januaro 1904 en Varsovio, en la tiam gepatra loĝejo, strato Dzika 9, ekde 1931 renomata Zamenhof-strato.

Ĉarma kaj petola knabino estis Lidja. Ekde la infanaĝo ŝi piano-ludis, ankaŭ ŝatis pentri, montris nemalŝatindan talenton. Iu esperantistino, Juli Wolfson, foje vizitinta la familion, konstatis, ke "ŝi", la sesjara blondulineto, plene komprenis la signifon de la vorto "ĉokolado"... Fakte la etulino ne tro emis "esperantiĝi" kaj, krom "ĉokolado"-n, ŝi konis nur la esprimon "bonan nokton"... Sed kiam estis okazonta la 9a Universala Kongreso en Berno (Svisio), la patrino admonis ŝin, aludante la fakton, ke oni ne komprenos ŝin !

Sekve, Lidja, dum ses semajnoj, mirinde progresis je la ellernado de la lingvo ! En Berno, la gepatroj kaj Lidja renkontiĝis kun Adamo kaj Sofia, kiuj tiam studis medicinon en Lozano.

Jarojn poste, kiam D-ro Zamenhof pro malsano ne kapablis labori, kaj ripozis sur sofo, Adamo per violonĉelo kaj Lidja, akompanante sian fraton per fortepiano, provis iom konsoli la patron per muziko. En 1913, Lidja eniris la okan klason de la Reala Lernejo por Inoj de la Societo de la Kooperativa Lernejo en Varsovio, kiun ŝi vizitadis ok jarojn. En majo 1921, Lidja plenumis la "maturec-ekzamenon". En 1925, ŝi ricevis la titolon de magistrino pri juro... Tiam ŝi estis 21-jaraĝa !

Tamen, al la jurista profesio ŝi ne dediĉis sin : la genia kreaĵo de la patro plene allogas kaj absorbos ŝin...

Dum la 16a Universala Kongreso en Vieno en 1924 ŝi estis elektita kiel provizora sekretariino de Internacia Studenta Esperanto-Asocio. En 1930 ŝi akiris diplomon de instruistino de Esperanto laŭ la fame konata Cseh-metodo. Ravita pri ĝi, ŝi skribis al S-ino Julia Isbrucker : "Mi mem instruas Esperanton, mi konas ĉiujn malfacilaĵojn de la instruado kaj estas sekve sufiĉe kompetenta, por ĝuste taksi la elstaran kurson de S-ro Cseh. Mi sentas sinceran admiron al tiu vere genia pedagogo kaj grandan dankon al la organizintoj de la kurso, precipe al vi, kara Sinjorino".

Ekde nun, Lidja instruos laŭ tiu metodo en Varsovio kaj en multaj lokoj eksterlande. En la fino de 1932 ŝi gvidas kursojn en Gävle kaj aliaj urboj de Svedio.

Poste, sian laboron ŝi daŭrigas en Francio en 1933 : Romans, Châteauroux, Lyon, Grasse, Vence kaj Marseille. Printempe 1934 Lidja partoprenas la Provencan Esperanto-kongreson en St-Raphaël kaj honorĉeestas inaŭguron de la Zamenhof-strato. 1934 : Franca Esperanto-Kongreso en Bordeaux. Nelacigeble ŝi traveturas la landon. Kun S-ro Borel ŝi parolas antaŭ mikrofono de radio-stacio Lyon II. Jen ŝi denove eksterlande dum la Universala Kongreso de Stokholmo. Reveno al Francio kiel gvidantino de novaj kursoj : Châteaurenard, Orléans, Thiers, Romans, Clermont-Ferrand, Moulins kun akceptoj far urbestroj.



Ŝi prezidas en Perpignan la jaran konferencon de la Federacio Langvedoko-Rusiljono. Sin sekvas kursoj en Villeurbanne, Oullins, Villefranche. En 1935 Lidja inaŭguras en Romans placon dediĉitan al sia patro. Gastino en la Universala Kongreso de Romo, ŝi "flugas" norden por gvidi kurson en Haguenau. Alvoko de la grupoj de Saint Etienne, Toulon, ktp. Samtempe ŝi kunlaboras kun diversaj Esperanto-gazetoj...

Se la iniciatinto de Esperanto siajn religiajn sentojn esprimis antaŭ ĉio en la *Preĝo sub la verda standardo* kaj *Hilelismo*, Lidja-n plene kaptis kaj ensorbis la nova universala religio -bahaismo-, fondita de Perso, Baha'y'llah (1817-1892). Tial ŝi atingas Usonon por prelegi en organizaĵoj de la bahaa movado kaj intertempe gvidi Esperanto-kursojn : Novjorko, Filadelfio, Detroit, Baltimore, ...

S-ino Roan Orloff Stone en Nov-Meksiko tiel priskribas sian renkontiĝon kun Lidja : "Estis la 31a de decembro 1937, antaŭvespero de la novjaro... Mi alproksimiĝis al la blonda, silenta, verdflave vestita "muŝeto", kaj mi vidis du belajn okulojn, sed plenajn je soleco... Mi komprenis, ĉar ankaŭ mi estas jud- ➤

Le saviez-vous



La komputilsistemo Windows NT (NT por *Nova Teknologio*) de Microsoft uzas Unicode karaktrarsistemon (por 2 bajtoj po karaktero), kaj liveras unu ekzemplan karaktraron

(Lucida), kiu entenas niajn ŝatatajn ĉapelitajn literojn.

Unicode karaktraro havas kategoriojn. E-literoj estas en unu el la unuaj (latin extended-A). Fakte la karaktraro de Microsoft ne estas kompleta, detalpunkte mankas la ĉinaj kaj japanaj karakteroj...

Atentu, ke "Windows NT" ne estas "Windows", kiu funkciigas ies PCojn, sed profesicela sistemo (komparebla kun Unix) relative nova, kaj miakone la nura, kiun ofertas Unicode-karaktraro.

(informas Filip')

➔ devena. Kiel unu "Cseh-metoda instruistino" al alia, mi diris "Bonan vesperon ! Roan Orloff mi estas... Kiu estas vi ?" Tuj, per la magio de tiuj Esperantaj vortoj, per la feliĉa sento de tiu mondfama Cseh-metoda prezentiĝo, tuj la malĝoja vizaĝesprimado ŝanĝiĝis al rideto...

Eĉ rido brilis en la bluaj okuloj, dum ŝi respondis : "Mi estas Lidja Zamenhof !"

Lidja tradukis multajn verkojn : "Universala Paco, la Celo de Nova Mond-Ordo", ktp. Ŝi revenis Varsovien la 10an de decembro 1938 kaj plu-aktivis en loka Esperanto-movado, prelegante pri la lingvo kaj daŭre gvidante kursojn.

Impresema kaj delikatsenta, Lidja tiel aŭgure skribis al amiko en Provenco, la 26an de majo 1939 : "Jes, mi estas pli juna ol vi, sed baldaŭ povos veni tempo, kiam juneco kaj forto restos senpovaj kontraŭ furiozo malkatenita de homaj manoj, kiam la milita monstro malfermos faŭkegon. Pli sekura vi estas tiam en izolita bieneto en Provenco, ol mi en la ĉefurbo. Sed antaŭ ĉio ni devas memori, ke ni estas ĉiuj en la manoj de Dio. Ni dependas de Li, Li estas nia rifuĝejo kaj ŝildo. Kiel ajn nigraj estas la nuboj super la ĉielo de la homaro, kiel ajn teruraj tondroj el ĝi pasos nuboj kaj denove ekbluos super la mondo la ĉielo".

La 1an de septembro 1939, germanaj trupoj invadas Polujon. Dum la sieĝo de Varsovio estis detruita far aviadilbomboj la domo ĉe strato Krolewska 41, kie, sur la 3a etaĝo, troviĝis la loĝejo de Ludoviko Zamenhof. Post la morto de la gepatroj, en la vasta kvinĉambra apartamento loĝis Adamo, lia edzino D-ino Vanda kun la filo Ludoviko, ankaŭ D-ino Sofia kaj Mag. Lidja. Diversaj memoraĵoj pri la iniciatinto de la lingvo estis pie konservataj en la loĝejo. Ankaŭ la kabineto, en kiu li kutimis labori, restis preskaŭ senŝanĝa. Post detruo de la domo, la familio Zamenhof ekloĝis ĉe ges-roj Minc. Janina Minc estis fratino de Vanda.

Kelkajn tagojn post okupo de Germanio, estis arestita en juda hospitalo Adamo Zamenhof, plenumanta tiam funkciojn de ĉef-direktoro. La saman tagon oni arestis lian edzinon Vanda, kaj la fratinojn Sofia. Samtage - jes ! - Lidja kaj D-ro Minc, kiu ne estis esperantisto, suferis similan sorton. Ekde januaro 1940, Adamo kaj S-ro Minc ne plu troviĝis en la Varsovia malliberejo Pavjac. Restas hodiaŭ tute nekonataj la precizaj cirkonstancoj de ilia morto...

Post okupo de Pollando la Germanoj tuj komencis persekuti la civilan loĝantaron, precipe la judan. Jam ekde novembro 1939 ĉiuj judoj, plenkreskuloj kaj infanoj devis surhavi la specifan "senhonorigan" flavan stelon sespintan... En novembro 1940 estis kreita getto, tuj ĉirkaŭata de altaj muroj kun pikdratoj supre. Varsovio terure "famiĝos"

GRUPO DE ESPERANTISTAJ BANKOFICISTOJ en Wien — Aŭstrio

Wien, en Novembro 1923.

Kara sinjoro kolego !

La progreso de Esperanto en nia urbo devigas nin, turni nin al Vi kun jena sciigo kaj peto.

Ni sukcesis interrilati kun la estraro de la sindikato de la aŭstrijaj bankoficistoj, kiu reprezentas 25.000 organizitajn membrojn, kaj atingi, ke la oficiala gazeto „La aŭstria bankoficisto“ ĉiunonate havos anglon en kiu estos raportoj pri la nacia movado kaj organizacio de bankoficistoj en ĉiuj landoj.

Ni vienaj esperantistaj bankoficistoj transprenis la taskon prizorgi la raportojn pere de niaj samideanaj kolegoj el ĉiuj landoj. Tial ni petas ankaŭ Vin kunhelpi ĉe nia tasko per Via kunlaboro. Bonvolu al ni sendi sciigojn pri la organizacio de bankoficistoj en Via urbo kaj lando, kaj pri la salajraj kondiĉoj. Sendu al ni tradukoj de gravaj artikoloj el Via gazeto pri fakaj aferoj kaj bonvolu kun ni korespondadi pri ĉio, kio koncernas bankan kaj bankoficistan vivon.

Ni promesas al Vi, ke Viaj leteroj estos represitaj en nia faka gazeto kaj ke ni en la plej proksima tempo sendos al Vi raporton pri la evoluo de la bankoficista movado en Aŭstrio.

Pri la graveco de nia entrepreno ni petas Vian kolegan subtenon, kaj bonvolu Viajn leterojn direkti al la adreso de samideano kolego RAJMUND ĈECH, Wien, IX, D'Orsaygasse 7.-23 Aŭstrio.

Kun kolega saluto kaj antaŭa danko
por la estraro de la

pro tiu abomena karcerego... En tiun fermitan kaj severe garditan spacon - relative ne granda - oni enŝtopis pli ol 400 000 judojn el la ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Ege teruraj iĝis la vivkondiĉoj. Regis malsato, malsanoj, ... Morto forrabis multajn personojn. En tiu Varsovia getto troviĝis ankaŭ la restantaj membroj de la familio Zamenhof : Vanda kaj Sofia deĵoris kiel kuracistinoj, junulo Ludoviko, en oficejo, Lidja instruis... la anglan lingvon !

ELLES L'ONT FAIT

Pourquoi ne pas obtenir votre licence en traitant d'un sujet tel que... l'Espéranto ?

Et oui, pourquoi pas ?

Deux étudiantes de l'Université de Vienne, en Autriche, l'ont fait et pas sur n'importe quoi. L'une, Andrea Trumler, a traité l'histoire du mouvement espérantiste chinois des 45 dernières années. Chapeau, me diriez-vous mais Claudia Lederhofer a fait encore mieux car elle a fait sa dissertation sur ce même mouvement mais de Zam' jusqu'à 49 !

Pourquoi le mouvement chinois et pas celui d'Autriche ? Tout bonnement parce qu'elles ont passé une licence en sinologie.

Allez, au boulot !

Jen la plej grava evento de la jaro en Francio :

IP RB IB IF II

Antaŭ nun unu jaro kaj duono mi partoprenis al KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) en Kopenhago. Dum kvar tagoj mi spertis bonegajn ekzemplojn de la Esperanto-kulturo. Interalie koncertis ĉiuj gravaj rok- kaj pop-grupoj. La etoso estis vere bonega. Revenante de tiu aranĝo mi pensis : "verŝajne iu tia festivalo neniam okazos en Francio." Mi eraris, ĉar fakte festivalo je tiu nivelo okazos en Francio, kaj estos ĉi-jare !!!

De la 13-a ĝis la 16-a de Julio '95, en Tuluzo, PREFI (Pop & Rok Esperanto Festivalo Internacia) prezentos la plej aktualajn muzikgrupojn kaj artistojn popajn kaj rokajn, kiuj kantas i.a. en Esperanto. Temas pri juvela kaj unika okazo por travivi neforgeseblajn tagnoktojn spektante grupojn kaj kanzonistojn kiel AMPLIFIKI, KAJTO, PERSONE, ROZMARIAJ BEBOJ kaj multajn aliajn.

Ne maltrafu tiun okazon por plenumi novan paŝon en la historio de nia kulturo. La aliĝilo aperos en la sekvanta numero ♦



Julio 1942 : komenciĝas ekstermado de la getto-loĝantaro far la Germanoj. Perforte kaptitajn judojn - virinojn, maljunulojn, malsanulojn... kaj infanojn - oni premamasigis en porbestajn vagonojn kaj sendas al Treblinka, kie, en 10 gas-kameroj, forpasos miliono da homoj. En Oswiecim (Auschwitz) ĉirkaŭ tri milionoj da judoj estis murditaj... kaj pli ol unu miliono da nejudoj... Du milionoj pereis en la murdejoj Majdanek, Sobibor, Belzec kaj en diversaj aliaj koncentrejoj.

Aprilo 1943 : la getto estas definitive likvidita. Oni eĉ ebenigis la lokon per tertransportoj. Iom antaŭe nobla pola esperantisto, Jozef Arsenik, volis savi Lidja, kaŝante ŝin... ŝi rifuzis, esprimante la nepran deziron ne forlasi la parencojn... Ŝi ja sciis, ke tiujn homojn, kiuj alportas helpon al judoj, minacas mortpuno. Doktorinoj Janina kaj Vanda - kun la filo Ludoviko sukcesis sin savi... sed la du filinoj de la kreinto de Esperanto pereis kun milionoj da samgencanoj. Ankaŭ la sama sorto trafis aliajn parencojn de D-ro Zamenhof.

Tre mallonga estis bedaŭrinde la vivo de "Lili". Entuziasme kaj fervore ŝi daŭre agis por disvastigi la ideojn kaj idealojn de sia amata patro. Ŝi ankaŭ kredis, ke la nova religio alportos savon al la turmentata homaro...

17

Nobla, bonkora, altanima, idealismo-plena, servopreta estis Lidja Zamenhof... Indan lokon en la Esperanta Panteono Ŝi meritas.

Honoron al ŝia memoro !

resumis Odette SCHEIDEL

Tony



KIUJ

ESTAS ILI ?

Nomo : FLOCHON

Antaŭnomo : Bruno

Naskiĝdato kaj loko : 16/08/71, Lyon 7

Okul-koloro : nukseta

Staturó : 1m75

Profesio : komercisto-redaktisto

ESPERANTO :

Malkovris Esperanton en 1987 dank' al sia frato Denis, kiu lernis la internacian lingvon tiu-epoke. Tre rapide ŝatis la ideon de esperanto kaj faris la dek "rendez-vous" de UFE dum unu aŭ du jaroj.

18

Li aliĝis neniun grupon antaŭ sia alveno en la komerca altlernejo de Poitiers, kie li renkontis frue - sed tute hazarde - Olivier Moreau. Tiu bone konata membro de la komitato de JEFO estis la sekretario de la asocio en 1991, kaj studis de unu jaro en la lernejo ESC Poitiers. Olivier ne bezonis multe da tempo por aligi Bruno-n al JEFO. Kunkune, ili laboris por krei etan grupon de esperantistoj en la lernejo.

Nun, Bruno estas la nova prezidanto de JEFO, elektita dum la Ĝenerala Kunveno de Dijono.

PRIVATE :

Mi studis internacian komercon en Lyon dum du jaroj post la bakalaŭreco por esti diplomita pri BTS. Poste, mi eniris en ESC Poitiers por plilonge lerni tiun fakon dum tri jaroj. Diplomita en junio 94, mi serĉis laboron dum 4 monatoj kaj trovis apud mia familia urbeto en la proksimeco de Lyon. La firmao organizas la salonojn Linguissimo (lingvoj, kulturoj kaj vojaĝoj por granda publiko) kaj *Classe Export* (kontaktoj inter eksportistoj kaj fakuloj pri internacia komerco) en Lyon, kaj publikigas la magazinon *Classe Export* (ankaŭ por firmaoj kiu volas eksporti). La prezentado estis necesa por kompreni mian laboron : vendi varbadon en la magazino, budojn en la salonoj kaj skribi artikolojn.

ŜATOKUPOJ :

Mi pasiiĝas pri aŭtomobiloj (speciale Citroën...), internaciaj rilatoj kaj naturprotekto. Mi longe aŭskultas muzikon (tre diversajn) kaj multe legas. Mi ŝatas vojaĝi, sportumi, renkonti amik(in)ojn kaj kuiradi.

MIA OPINIO PRI ESPERANTO :

Esperanto estas "mirakla lingvo", ĉar ĝi estas tiel juna kaj tiel larĝe konata, ke oni ne povas pensi, ke ĝi ne povos pli kreski. Sed ni ne devas esti tro malpaciencaj, ĉar la mondo evoluas kaj evoluos tiu-fine de jarcento. La homaro volas kaj bezonas komuniki pli kaj pli. Esperanto estas la nura solvo !

MIA OPINIO PRI JEFO :

Mi nur aldonas al la bilanco de la asocio, ke esperanto bezonas gejunulojn por kreskigi kaj ŝanĝi ties bildon de malnova lingvo, kaj la junuloj bezonas esperanton por renkontiĝi kaj vojaĝi tra la mondo ♦

JAKA

DEMANDOJ VIAJ RESPONDOJ NIAJ




KONGRESO EN FRANCIO ?

Mi aŭdis pri granda kongreso en Parizo en 1995 : ĉu vi povus pli informi pri tio ?

Ja en 1995, de la 2a ĝis la 6a de Junio, okazos Esperanto-Eŭrop-Unia Kongreso. Post la Eŭropa kongreso de Verono (Italio) en 1992, en tiu kongreso estos reprezentataj interalie pluraj landoj : Germanio, Britio, Italio, sed ne nur ili.

Aliĝ-kotizo por ekz. studento estas 150 FF, do okazo por renkontiĝi, kaj babili kun multnaciecaj homoj, en sia propra lando.

Informo aperos en la venonta *Jeun* Esperanto-INFO, sed vi jam povas pli informiĝi kaj ricevi la aliĝilon, skribante al : U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto), ĉe la sama adreso, kiel JEFO.



PACIENCON ! (demando farita en Novembro)

Mi pagis abonon al *Monato*, kaj ricevis leteron informantan min, ke mi devos atendi Januaro-monaton por ricevi mian unuan numeron !!

Same kiel la TEJO-bultenoj, la abonperiodo validas de Januaro al Decembro. Relegu la saman rubrikon, p.19 de la bulteno n°94/4.



SEKRETA... SEMAJNFINO

Mi eksciis pri la Mustarda Renkontiĝo, la tagon, kiam ĝi komenciĝis ! Ĉu vi ne povintus informi pri ĝi pli frue ?!

Tiun renkontiĝon ni tre (aŭ tro ?) malfrue decidis organizi : nur fine de septembro. Kaj malgraŭ tuja dissendo de la informo al diversaj gazetoj kaj asocioj, eventualaj partoprenontoj estis informitaj nur meze de

KIEL, kaj signifanta : estanta, havanta efektive la karakteron de ks : "li estis vera pagano, sed li mortis estiel kristano".




TINTIN... TINĈJO MILOU... MILUO

Kiuj Tinĉjo-libroj nun disponeblas ? Kiuj aliaj bildrakontoj eldoniĝis en Esperanto ?

Estis eldonitaj du Tinĉjo-aventuroj en Esperanto, nome : "La krabo kun oraj

Vous nous l'avez demandé

decembro ! pro malfrua apero de gazetoj, interalie de *Jeun* Esperanto-INFO ! Venontfoje, ni pli frue decidiĝos.



LINGVA DEMANDO

Mi ne komprenas la vorton "estiel", maldekstre malsupre de la paĝo "GAZETARO" (bulteno 94/4)

Tiu vorto estas PIV-a sed ne fundamenta. Laŭ PIV, "estiel" (neologismo) estas "partikulo proponita por eviti la konfuzon inter la kompara kaj la identiga senco de

pinĉiloj" kaj "La nigra insulo". Ambaŭ plu estas disponeblaj en iu ajn bona E-libroservo".

Alia fama bildrakonto esperantigita estas "Asteriks' la Gaŭlo". Bedaŭrinde la vendebla stoko jam elĉerpiĝis, sed antaŭnelonge, Kroatia eldonejo ekdecidis eldoni plurajn titolojn de la serio ! Ni atendu. Krom tiuj famegaj bildrakontoj, estas aliaj el diversaj landoj (La "aventuroj de Tom Sawyer", "La Faraono", "Nudpieda Gen", ...). Planitaj estas ankaŭ diversaj projektoj, kiel tradukoj de Gaston Lagaffe, ..., kaj de "Les Bidochon en vacances" ("Familio Ventraĉul' ferianta", far Nice-grupanoj) ♦

19

JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO

jeun Esperanto

4 bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS

Direktoro de la eldono
Directeur de la publication :
Bruno FLOCHON (CITRON)
Ĉefredaktoro
Rédacteur en chef :
Christophe FERÉ (JAKA)

Ilustristoj
Illustrateurs :



Skizisto
Maquettiste :
Christophe FERÉ

Redaktora taĉmento

Equipe de rédaction :
B. Flochon, L. Vignaud,
P. Bérizzi, O. Scheidel, T.
Guyot, Y. Bachimont, Karl
NULO, kaj la minitelistoj de
3615 ESPERANTO...

Tiu ĉi numero kompostatis komputore fine de januaro kaj presatis je 250 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO, plenu kaj sendu nian aliĝilon. Ne forgesu, ke JEFO deĵoras ĉe la sidejo ĉiujn unuajn kaj triajn sabatojn ĉiumonate, ekde la 14a horo (kurso je la 16a). Sendu viajn artikolojn antaŭ la 1a de marto por la dua numero de 1995.

Ce numéro a été composé fin janvier et imprimé à 250 exemplaires. Pour adhérer à JEFO, remplissez et envoyez notre bulletin d'adhésion. N'oubliez pas que JEFO se réunit au siège tous les 1ers et 3èmes samedi de chaque mois (cours à 16h00). Envoyez-nous vos articles avant le 1er mars pour le 2ème numéro de 1995.

Les articles n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou non.

Tous droits de reproduction autorisés sous réserve d'indication de l'auteur et de la source, et sur simple information à JEFO.

Imprimerie : spéciale
Dépôt légal : à parution

“Eduku ! c'est un gros mot ?”

*Pas encore d'espéranto
sur la Cinquième :
ça va se savoir.*

5

La Cinquième



La 5ème chaîne dite de la Connaissance et du Savoir a commencé le 13 décembre aux heures où Arte n'émet pas. Un gros effort sur l'enseignement des langues a été prévu : 30 minutes par jour multidiffusées. Les langues retenues sont : l'anglais, l'allemand, l'italien et l'espér... Euh non, l'espagnol !

*(el Minitela mesaño de *Ziko)*